

80%  
7.10.1981

# NIA FOLIETO.

## UNA Abonprezo :

... Fr. 1,25

... Fr. 1,75

respondkuponoj inter-  
aj, haveblaj eĉ la  
...oj.

• **LA PROGRESO** •  
Esperanto-klubo

REDAKTEJO :

**V. Hendriex**  
Zalmstraat 43  
GENT — Belgujo.

## KORESPONDADO :

Ĉiu dulinia anonco kostas  
unu respondkuponon.

Ĉiu abonanto rajtas fari  
unu epresaj-on sepage.

**Aviso al la kunlaborantoj :** Ne subskribitaj artikoloj ne estas akcepteblaj. Se  
grinde oni aldonu pseŭdonimon publikigotan. Nur la subskribintoj restas respondaj  
la artikoloj enmetitaj. La artikoloj ne enserititaj ne estas retrosendataj.

## IX<sup>a</sup> Belga Kongreso de l'Esperanto en St. Gilles. (24an de majo 1920)

### PROGRAMO.

UNUA TAGO. — DIMANĈO.

- 1/2 h. Akcepto en la Norda stacidomo.
- 1/2 h. Ĝenerala kunveno de la « Belga Ligo Esperantista » en la ĉambrego de la  
malnova urbdomo, Parvis St. Gilles.
- h. Oficiala akcepto farota de la urbestro en la belega nova urbdomo de St. Gilles.  
Poste. Fotografado kaj filmado.
- h. Festmanĝo. — Post la festeno, fakaj kunsidoj, urbvizitado.
- 1/2 h. Granda artfesto en la malnova urbdomo de St. Gilles. Prezento de: « Devo  
de Rego », « La Fajrero », kantoj, deklamoj, parolado kun lumbildoj pri la pro-  
milaj belgaj ruinaj-oj.

DUA TAGO. — LUNDO.

- 1/2 h. Kunveno en la Oficiala Informoficejo 19, Grand'Place, Bruselo. Daŭrigo de  
la urbvizitado. Tagmanĝo laŭvola aŭ kuna.
- 1/2 h. Forveturo por belega ekskurso al Tervueren per tramveturilo.

### TAGORDO

de la Ĝenerala Kunveno de la « Belga Ligo Esperantista »

1. Malferma parolado de la Prezidanto.
2. Raporto de la Ĝenerala Sekretario pri la Esperanto-movado.
3. Raporto de la Kasisto pri la financa stato.

4. Kiel abonigi nian eldonotan oficialan organon? (Parolado de Sro. Wewer de la Ledeberga grupo.)
5. Esperanto kaj la blinduloj. Parolado de Frato Ludoviko de la Rega Instituto por blinduloj de Woluwe.
6. Eventualaj komunikajtoj.

LEGU ATENTE. — La kongreskarto kostas 5 frankojn; ĝi rajtigas creesti la vesperfeston, la ekskurson, k. t. p.

La prezo de la partopreno en la festmango estas 12 frankoj.

La organiza komitato sin okupas pri la log'ado: la kongresanoj povas rezervigi al si erambon po Fr. : 3.00, 4.00, 5.00, 6.00 ĝis 20.00 k. p.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al Fino, M. A. Jenneu 39, Rue d'Albanie, Bruxelles: por la log'ado al Sr Pieus, 19, Grand'Place, Bruxelles kaj oni sendu la koston de ĉiuj mendoj al S<sup>ro</sup> Mattheux.

## AL LA KONGRESO la 23-24-an de Majo 1920.

Sendu la kotizajton (5 frankojn) al S<sup>ro</sup> MATTHEUX, avenue Bel Air, 15, Uccle, Bruxelles.

### Al la Abonintoj!

Niaj geabonintoj bonvolu senkulpigi nin pro la malfrua apero de la nunaj numeroj.

La ĉiam plikarigo de papero kaj laboro, kaj aliaj malagrablajtoj lokigis nin en malfacila situacio, precipe pro nia tro malalta abonprezo. Ni ne povas, kompreneble, pagigi pli la nunajn abonintojn; ni tamen faras varman alvokon al ili por ke ili helpu nin ĉu per alsendo de anoncoj, ĉu per iu ajn krompago.

Antaŭajn dankojn al la donacemuloj!

### Tagoj de Amo kaj Poezio.

El la romano « MAXIMO »; capitulo XVIII. Tradukis E. E. Guerra.

— Adiaŭ, amiko mia, felicitan vojag'on. Miajn salutojn al Ferrer, kaj ne forgesu daŭradi la sendadon de informoj por la gazeta batalado kontraŭ Diaz-diris Del Marmal ĉirkaŭpremanie sian amikon Maksimon kiu estis suprenironta trian klasan kupeon el la « London & Northwestern Ry ».

— Adiaŭ, amiko Tarrida, kaj dankojn por ĉiuj viaj bonajtoj kaj via sindona helpo en nia batalado por nia libereco.

Kiam Maksimo sidig'is sur komforta sidloko de la kupeo, li pensis je la diferenco inter tiu hispano tre kulturita kaj tiel simpatia kaj revolucia kaj la komercistoj de spicoj jam ric'ig'intaj aŭ la krudaj hispanoj kun kiuj li laboris en la fabrikejoj de sia lando.

Je la naŭa vespere, ĝusta horo el la vojira priskribo, la vagonaro alvenis Brightonon.

Dora atendis Maksimon je la perono, sed ne plu kun serioza micno kiel la unuan fojon, nek ankaŭ kun la timo pri fizika elrevigo, sed kun la natura malpacienco kaj gojo revidi la homon al kiu ŝi donis sian koron kiu nek ankaŭ estis aminta.

Ĉe Sinjoro Goodwing, kie Maksimo estis jam kiel ĉe sia propra hejmo, oni akceptis lin kun sinceraj elmontroj de amemo.

Post la vespermango, Dora sidig'is ĉe la piano por kanti siajn preferatajn kantojn.

kaj la geamantoj faris uzon el la unua oportuno por intersangi la deziritajn kasitajn kisojn.

La idilio denove rekomencig'is, sed pli intima, sen timetoj.

Iuu posttagmezon, kiel kutime, ili iris por promenadi en la kamparo. Alvenante al proksima vilago kie estis bela arbaro, ili sidig'is sur faligita arbego kaj babiladis pri siaj impresoj.

Tio estis ideala amo. Du animoj kiuj konatig'is en la intelekta kampo je la interspaco de multaj mejloj; du estajtoj, kiuj kvankam el malsimilaj raso kaj kun diferenca temperamento, kaj vivintaj en malsamaj medioj kaj ne akordig'intaj pri diversaj etikaj detaloj, tamen formis harmonian kaj ekvibratan tuton; du revemuloj kiujn alia revemulo, Zamenhof, per sia artelarita lingvo interrilatigis kaj la kaprica Sorto alproksimigis unu la alian por intensigi pli ankoraŭ tiam amemon naskitan kaj disvolvitan en kampo tute for el vulgareco.

Naturo estis bonhumora. Estis ĉarma vetero. Nenia nuboj makulis tiun ĉielon tre puran kiun la geamantoj rigardadis silente.

— Dora - diris Maksimo-, se ĉi konus kiom da maltrankvilaj horoj mi travivis post nia persona konatigo! Kiam mi konvinkig'is ke ĉi estis pli valora ol mi imagis ĝin, kaj ke pligrandig'adis la influo de ĉi sur mi, mi pensis ke ĉi neniam amus min, aŭ ke se ĉi amus min, ĉi ne konfesus ĝin al mi, ĉar ĉi familia aŭ la sociaj antaŭjug'oj konsiderigus ĝin al ĉi kiel afero ĝinda ami homon kiu ne povus ĉe prezenti al ĉi sian nomon.

— De kiam ĉi estis por mi la kara amiko, la preferata amiko - diris Dora - mi komprenis ke mi amis ĉin kaj ke ĉi ankaŭ sentis por mi saman inklinon. Ni konatig'is dum cirkonstancoj en kiuj ne povus ekzisti ia ajn intereso en la materiala senco; mi estas iom fatalista kaj eble ĉi estos la homo por mi. Eble, ankaŭ mi neniam estos ĉi edzino; la edzigo neniam estis por mi kiel nemankebla celo, ĉar mi deziras kiam mi starigos hejmon eligi ĉiujn rutinojn kaj tio ĉi estas ja malfacila; tial mi povas atendi pacience ĝis Sorto, mi ne diras Dio ĉar ĉi ridetos je mia belega naiveco kiel ĉi ĝin nomas, decidus ĉion. Nur mi petas de ĉi ke ĉi estus fidela al mi kaj ke ĉi amu min tiel sindone kiel mi amas ĉin. Post ĉiaj honestaj klarigoj pri la leg'aj baroj kiuj malpermesus ĉi reedzig'igi, mi amas ĉin pli ankoraŭ ĉar mi konstatas ke ĉi ne estas intriganto nek antaŭ la virinoj. Sed eble iatage... kiu scias....

— Dankojn, Dora - respondis Maksimo tre kortusita-, mi ne esperis de ĉi malsimilan aferon. Ĉi estas tiel bona kaj nobla! Ĉi amas malbonsanculon kiu ne povas doni al ĉi ion krom sian koron kaj estas mia devo esti iuda de virino kiel ĉi

(daŭrigota.)

### La Oratroj de Diabolo al la enlog'antoj de la urbo Homanimo.

eltirajto de la « Sankta Milito » de John Bynian, (XVII<sup>a</sup> jarcento).

Johano Bunyan estis lutisto kiu log'is apud Bedford, kieli anig'is al la « Anabaptistoj », Li kus'is en la mallibereco de 1660 ĝis 1672; dum tiu tempo li multe verkis. Inter aliaj li verkis la « Progreso de la Pilgrimanto », ankaŭ la « Vivo kaj Morto de S-ro Malbonulo ». En la jaro 1682-a li publikigis sian « Saktan Milito » ĉu pri kiu S-ro A. R. Buckland skribis: « Se S-ro Bunyan estus verkiinta nenion pluan, la « Sankta Milito » estus sufiĉinta por rajtigi lian pretendon al loko inter la majstroj de angla prozo. »

(Diabolo, do, kvazaŭ li estas s'afido komencis sian oratadon, dirante:)

« Gesinjoroj de la fama urbo, Homanimo, mi estas (kiel vi povas ekvidi) neniu log'anto malproksima de vi, sed proksima, kaj devigato de la rego por fari al vi mian

respektegaj on kaj tian servon, kian mi povas, tial, por ke mi estu fidela al mi mem kaj al vi, mi havas ion gravan por komuniki al vi.

» Tial, donu al mi la aŭdadon, kaj aŭskultu al mi paciencie. Kaj, unue, mi certigos vin, ne estas mi, sed vi, ne mia, sed via profito kiun mi celas per tio, kion mi nun faras, kaj estos planplene elmontrita per tio, ke mi malfermis la intencan al vi.

» Car, gesinjoroj, mi estas (dirante al vi la veron) veninta por montri al vi tion; kiamaniere vi povas havigi al vi grandan kaj planan liberecon el mallibereco, sub kiu vi estas kaptata kaj sklavigata.

— Je tio, la urbo Homanimo eklevis la orelojn. Kaj « Kio estas? » « Do! Kio ja estas? » ili pensis.

— Kaj li diris: « Mi havas ion por diri koncerne vian Regon, koncerne vian legon, kaj ankaŭ rilate al vi mem. Rilate al via Rego, mi scias, ke li estas granda kaj potenco; tamen, ĉio kion li diris al vi estas nek vera, nek por via profito.

» I<sup>o</sup>. — Ĝi ne estas vera, ĉar tio, per kio li ĝisnune timigis vin, ne okazos, nek plenumigos, kvankam vi faros tion, kion li malpermesos. Sed, se estus dangero, kia sklaveco estas, ĉiam vivi en timo je la plej forta el punoj, pro tiel malgranda kaj bagatela aĵo, kiel estas la mangado de imete da frukto.

» II<sup>o</sup>. — Rilate al liaj legoj, ĉe tio mi plue diros, ili estas ankaŭ neraciaj, ankaŭ malsimplaj, ankaŭ netolereblaj, neraciaj, kiel estis antaŭe sugestate, pro tio, ke la puno ne estas proporciata al la peko; estas grandaj malsimileco kaj malproporcio inter la vivo kaj kono; tamen la unua devas forigi pro la alia: laŭ la lego de via S'adajo. (a) Sed ĝi estas ankaŭ malsimpla, en tio, ke li diras ke vi povas mangi de ĉiuj, kaj tamen poste malpermesas la mangadon de unu. Kaj do lastfoje, ĝi devas necese esti netolerebla pro tio, ke tiu frukto, de kiu vi estas malpermesataj mangi (se vi estas malpermesataj pri ĝi) estas tiu kaj tiu sola, kiu povas, per via mangado, doni al vi bonajn ĝisnune nekonatan de vi. Tio estas videbla per la nomo mem de la arbo; ĝi estas nomata la « arbo de la kono de bono kaj malbono »; kaj ĉu vi jam havas tiun konon?

« Ne! ankaŭ vi ne povas imagi kiel bona, kiel plaĉa, kaj kiel dezirinda estas ĝi por sagiĝi, tiel longe, tiel vi agas laŭ la ordono de la via Rego.

« Kial vi estas timata en nescio kaj blindeco? Kial vi ne pligrandigu en scio kaj komprenado?

« Kaj nun, ho vi ĝeenlogantoj de la fama urbo Homanimo, parolante pli speciale al vi mem, vi ne estas libera popolo. Vi estas tenata, ankaŭ en mallibereco, ankaŭ en sklaveco, kaj tio per ĉagrena minaco; nenia kialo aldonata, krom, « Tiel mi voias, tiel estu ».

« Kaj ĉu ne estas ĉagrene pripensi, ke tiu afero mem, kiun vi estas malpermesataj fari, se vi povus ĝin fari produktus al vi ankaŭ saĝecon, ankaŭ honoron? ĉar tiam viaj okuloj malfermiĝus kaj vi estus kvazaŭ gedioj.

« Nu, pro tio, ke ĉi tiu estas tiel (diris li) « ĉu vi povas esti tenata de iu princo en plia sklaveco kaj en pli forta mallibereco, ol tiu, sub kiu vi estas hodiaŭ? Vi farigas subuloj, kaj estas ĉirkaŭvolvitaj en ĝenajoj, kiel mi bone elmontris. Ĉar, kia mallibereco pli granda, ol esti tenata en blindeco? Ĉu racieco ne diros al vi, ke estas pli bone havi okulojn, ol esti sen ili? kaj tiamaniere esti libera, pli bone ol esti enfermitaj en malluma kaj odoranta kaverno? »

NOTO. — (a) S'adajo — Rego de Homanimo.

Tradukis VESPERTO.

## Profesora distreco.

Profesoro H. estis tiel avara, kiel distritema. Li logis en malgranda vilao, kie li povis okupi sin la tutan tagon je siaj studo kaj libroj, dum lia edzino devis fari ĉiajn

domlaborojn. Foje okazis je iu tago, kiam oni atendis vizitantojn, ke la profesor-edzino devis purigi la tutan domon. Ŝi jam bone estis plenuminta sian taskon, kiam ŝi subite rememoris, ke la fenestroj eksterflanke ankoraŭ estis purigitaj. Por tio ŝi proponis al sia edzo dungi la vitrapurigistojn, sed tion li nepre rifuzis.

« Mi havas proponon », diris la scienculo. « Ni metu tabulon sur la fenestran sojlon kaj dum vi eksterflanke starigos por lavi, mi internafleke sidigos sur ĝi. »

Kaj tiel ili faris. Sinjorino staris ekstere, fervore lavante la fenestrojn, dum sinjoro interne sidis enprofundiginta en libron.

Subite iu sonoras. Sinjoro ektimas... « Jen eble jam alvenas la vizitantoj, » li diras eksaltante de la tabulo, kaj rapidegas al la ŝtuparo malsupren. Sinjorino tamen estis ankoraŭ pli rapide malsupre, kaj malferminte la pordon, ŝia edzo trovis ŝin kusanta sur la ŝtupo. « He Manjo, » diras la distrita profesoro, miregite, « ĉu estas vi kiu sonoris? »

Tradukis S. J. DEGENKAMP.

## Unua diskutanta kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj en Barcelone (27-30 Junio 1920)

Konsciante de la movado en nia lando postulas efikan reagadon por okupi la antaŭmilitan postenon kaj pusi pluen la progredon de nia lingvo, ni organizis « Unua Diskutanta Kunveno »-n, pri kies sukceso ni ne dubas, kun la celo veki la dormigintan fervoron de la esperantistoj en nia lando kaj due atentigi la eksteran publikon. La kunveno estos pure diskutanta kaj konsistos el diversaj fakoj: kuracista, jurista, laborista, ekspozicia, k. t. p.

Ni invitas la tutmondan samideanaron sendi temojn kaj proponojn por plej granda praktika rezultato de nia entrepreno, kies ĉefa trajto estas pruvi la utilecon de nia lingvo ĉe ĉiuj fakoj de la vivo.

Samtempe ni esperas, ke oni helpos nian ekspozicion sendante katalogojn, k. t. p., kies resendon ni garantias, se tiel oni petas.

Kosto de membrokarto, kiel protektanta aliginto, estas 1 Sm.

Organiza Grupo de la Kunveno: Esperantanara Fajro, D<sup>o</sup> Robert, 11, Sarriá (Barcelona) Hispanujo. Organiza Komitato de Ekspozicio: Esperanta Societo « Paco kaj Amo » Asturias, I, Barcelona.

## Esperanto ĉe la Argentinaj Komercestoj.

Pro propagando farita de la « Komitato por la propagando de Esperanto inter Komercestoj », inter ĉiuj komercistoj de Buenos Aires, oni povas skribi per Esperanto al ĉiuj firmaoj de tiu urbo. La citita komitato atentigis ilin pri Esperanto kaj deklaris sin preta, traduki en kaj el Esperanto, ĉiun komercan tekston, kiun oni prezentos al ĝi.

Se oni skribas al Argentina firmao Esperante, oni notu je la fino de la letero la sekvantan Hispanlingvan frazon:

« A causa de la imposibilidad de escribir en castellano, esta carta esta escrita en « Esperanto » y puede ser traducida en el Comité para la Propagación del Esperanto en el Comercio, Buenos-Aires, Florida 150 ».

Tiu komitato, cetere, respondas ĉiun demandon pri la Argentina komerca vivo; ĝi donas ankaŭ adresojn de rekomendindaj firmaoj por ĉiu aĵo branĉo aŭ specialaĵo.

KIO ĈIU BELGA ESPERANTISTO NEPRE FARU... ALIGI AL LA KONGRESO

## Komerca Informejo en Formosa.

Ciuj komercistoj estas petataj uzadi bonvole la informojn. La reguloj estas jenaj :

1. — La regiono de enketo kaj kolekto estas limigita en Formosa kaj suda Ĥinujo.
2. — La informejo prenas sur sin la taskon kolekti aŭ enketi en komercoj kaj industrioj, laŭ peto de komercistoj ambaŭ enlandaj kaj eksterlandaj.
3. — La komisianto estas petata priskribi la postulaĵojn plej koncize kaj legeble ciam kun plena adreso.
4. — La informejo postulas nenian pagon krom postaj kaj aliaj efektivaj por kolektado kaj enketado, kiuj lastaj estas pagotaj interkonsente.
5. — La Informejo ankaŭ negocas kiel agento komisia de c'ij eksterlandaj komercaĵoj kaj ĝeneralaj Esperantaj-oj.

C'ef espondeculo,

Redaktoroj respondecaj.

S-ro So-Pekfui

S-roj S. Ren kaj Ko-Tecu

sekretarioj de Formosa Esperantista Asocio 105- banc'i, C'usekilo, Gekans'o, Manka.

Taihoku, Formosa, Japanujo.

## Bibliografio.



## Gazetaro.

Sub tiu c'iu rubriko ni preparalos c'iujn verkojn, de kiuj du ekzempleroj estos senditaj al la redaktejo.

Por unu ekzemplero anonco estos farata.

1. RAPORTA STENOGRAFIO ESPERANTA. — Alfaro de la Angla Sistemo Pitman al Esperanto. Verkis Montagu C. Butler kun helpo de kelkaj amikoj. Kvina eldono-Ricevebla c'ie la secretario de la eldoninta Komitato, S<sup>ro</sup> P. J. Cameron, 67 Schubert Road, London, S. W. 15 aŭ c'ie B. E. A. 17 Hart street LONDON W. C. 1 Du s'ilingoj kaj ok pencoj. (13 resp. kup.). — Tiu broŝuro 47 paĝa diskonigas do je la 5<sup>a</sup> fojo la tre gloran, sed ne tre facilan anglan sistemon Pitman inter la Esperantistoj. La sistemo Pitman estas tiel speciale farita por la angla lingvo ke por c'iu alia lingvo ĝi bezonas pli malpli grandajn s'ang'ojn. C'ion la aŭtoro konfesas de la nuna frazo de sia antaŭparolo « al la lernonto ». Kaj la s'ang'oj estas ja gravaj, c'ar preskaŭ la tuta antaŭparolo proksimume dupaĝa celas klarigi kaj pravigi ilin. La aŭtoro tamen ne estas s'ovinisto c'ar en la lasta frazo li diras ke « al tiu kiu volas alfaron Pitmanan malpli oraste modifitan ol la nuna, li rekomendas la verkon de S<sup>ro</sup> A. W. Lyndridge ; kaj al tiu, kiu preferas sistemon « kursivan » la Gregg'an alfaron de S<sup>ro</sup> E. L. Jackson » kaj tui lasta sistemo estas grave diferenca kompare kun la Pitmana.

La verko estas precipe praktika : multajn ekzemplojn ĝi enhavas ; ĝi konsistas preskaŭ nur el stenografia teksto ĝi estas ege bele kaj legeble presita kaj tial tre rekomendinda al c'ij Esperantistoj-Pitman'anoj

1. GREGG SHORTHAND : *John Robert Gregg* ; Gregg. Publ. C<sup>o</sup>, 21 Harringtonstr. Liverpool, England ; Prezo 3 sh. 8 1/2 d.-18 resp. kup. Anglalingve.

GREGG SHORTHAND ADAPTED TO ESPERANTO by *L. Ernest Jackson*. — The Gregg Publishing Company-New-York, Chicago, San Francisco andat Liverpool, England, kosto \$ 0,75.

La Stenografio Gregg estas unu el la junaj sistemoj anglaj. Ĝi penas esti kursiva, uzante tamen signojn ankoraŭ iom geometriaj, tial ĝi havas aspekton iom hibrida, tamen

FLIRTU LA VERDA FLAG!!

SUPER BRUSELO.

pli grafika ol geometria ; ĝi ne uzas dikigojn, kio estas granda avantaĝo, kaj ne trouzas akcentojn. La sistemo de la vokaloj por angla lingvo estas lerte eltrovita. La tuta sistemo estas simpla kaj ĝi s'ajnas esti tre mallonga. Cetere ĝi uzas du gradojn, kiuj en la lernolibro estas pristudataj grade sed samtempe. Tamen ĝi bezonas ian alfaron al respektanto. Tion faris precize St. Jackson en la preparolata broŝuro, kiu estas skribita en Angla lingvo ; kaj tio estas bedaŭrinda, c'ar ĝi estas pro tio nelegebla de Esperantistoj ne konantaj la anglan lingvon kaj la sistemo plene meritas diskonigon en Esperantujo, precipe tial ke la sistemo Gregg de sia apero multe sukcesis en la Mondo, c'efe en Ameriko (ekzistas ankaŭ alfaro al la Hispana lingvo) ; cetere la broŝuro estas iom dependa de la Angla lernolibro mem, kio por Esperantistoj estas nova bedaŭrindaĵo. Ni do esperu ke aperos baldaŭ eldono plena kaj tute Esperanta de tiu interesa sistemo. La teksto mem estas tre bele presita kaj la stenografiaj monogramoj tre pure balskribitaj. La broŝuro estas nur 26 paĝa.

3. JAROSLAV CISAR : LA UNUA PREZIDANTO DE LA C'EH-OSLOVAKA RESPUBLIKO. Al la 70<sup>a</sup> datreveno de naskigo de T. G. Masaryk, tradukis Rud. Hromada-Praha, Februaro 1920 - C'eh-oslovaka esperantista informejo, Socharska 333, Praha VII, C'eh-oslovakio Prezo : 1 respondkupono.

Jen 10 paĝa broŝuro tre interesa kiu rakontas la vivon de la nuna unua prezidento de tiu nova sendependa kaj fiera lando kiu s'uldas sian ekzistadon al la disfalo de « Austrio-Hungario, Sklavo de Germanio » kaj ankaŭ grandaparte al ĝia nuna supera gvidanto, kiu, « kondamnita al morto de la aŭstria registaro ne c' indulginta sian bibliotekon kaj manuskriptojn, revenis post la milito en sian landon kiel nacia heroo, amata de la tuta nacio kiu estimas lin kiel personigon de c'io, por kio ĝi batalis kaj suferis dum tri jarcentoj ». Vivo tre bela, ekzemplodona, plena je kurag'o, naciismo kaj Scienco.

La stilo estas tre bona, la legado agrabla. Broŝuro tre rekomendinda kaj de kiu « pluraj ekzempleroj estas riceveblaj po unu respondkupono » pro ĝia propaganda celo, duobla : unue konigi eksterlanden Prezidanton Masaryk, due samtempe montri la utilcon de Esperanto, kaj sekve propagandi ĝin.

SVEDO KANTARO, KUN MELODIOJ, KOLEKITTA DE G. LO-FVENMARK. — Unua Kajero — Prezo : kr. 0,70 ; 1 franko. Sala, Svedujo, Eldonejo de E. L. : son Jnns Förlag.

Tiu 62 paĝa broŝuro estas dividita en tri partoj : 1 patrolandaj kaj popolaj kantoj ; ĝi konsistas el 16 numeroj ; 2<sup>a</sup> Kantoj kaj kantetoj diverstemaj (12 numeroj) ; 3<sup>a</sup> Religiaj kantoj (2).

C'ij tiuj kantoj havas kiel aŭtorojn, svedajn literaturistojn kaj muzikistojn, escepte kelkajn popolajn kantojn kies aŭtoroj, kiel ofte okazas, ne estas konataj.

La vortoj estas tradukitaj laŭ la muzika ritmo en Esperanta poezio de diversaj Esperantistoj.

La tekston de c'iu poeziaĵo antaŭstaras la melodio, duvoĉa por kelkaj kantoj ; Akompanaĵo estas aldonebla facile de c'iu muzikisto-pianisto iom harmonisto.

La ideo realigita en tiu c'iu broŝuro estas tre laŭdinda : diskonigi en la tuta mondo la trezoron de la naciaj kantoj, precipe de la popolaj ; c'ar tiaj kantoj estas la kerno de la nacia arto kaj inter ili estas ofte veraj perloj. Kia lingvo pli taŭgas por tiu celo ol la bela, harmonioplena Esperanto ? Esperantistoj c'uilandaj devus tiamaniere diskonigi sian nacian kantarono. Tio estus vera ric'igo por la tutmonda mizikamantaro seivola ; Espereble la sveda kolekto pl'plenigo's c'ar c'iu tiu broŝuro estas taksita kiel

C'IUJ AL BRUSELO DUM PENTEKOSTO!

« unua kajero » Ni deziras de nun bonvenon al la ceteraj. Ciuj estas tre utilaj por la Esperantaj grupoj dezirantaj kanti simplajn sed belegajn kantojn el fremdlando.

5. B. E. S. ADRESARO. — Gelegantoj atentu! Legu la avizon en la antaŭa numero, pag'o.

### Ni kore dankas pro la ĵurnaloj ricevitaj :

ESPERANTISTA LABORISTO	Aprilo 1920	NEDERLAND-ESPERANTO	77-81
ESPERANTO U. E. A.	Aprilo 1920	LA NOVA TEMPO	Febr.-Marto 1920
THE GREGG SHORTHAND MAGAZINE	April 1920	LA SVISA ESPERO	Marto 1920
LITERATURO	Marto 1920	LE TRAVAILLEUR ESPÉRANTISTE	Avril 1920
LE MONDE ESPÉRANTISTE	Mars-Avril 1920	LA VERDA OMBRO	Februaro 1920

« La Verda Ombro » -n ni sincere dankas. Kurag'e antaŭen ! Bedaŭrinde ke ne ĉiuj tekstoj estas latinskribe !

Nia Redakcio volonte ricevus kelkajn informojn pri la Japana skribo, ĝia uzo por Esperanto., la malfadilaj-oj de Esperanto por Japono pro tiu skribo, k. e.

## KRONIKO

**ANGLUJO.** — London : La Programo de la Londona Cefgrupo, St-Bride's Institute, Bride Lane, Ludgate Circus, E. C. London

- enhavas : La 7 an = Homa Evoluo (Bernard Long, B. A.)  
 " La 14 an = D<sup>o</sup> Zamenhof kaj lia faritaj-o (W. Bantfield)  
 " La 21 an = S'ango de Nia Monsistemo (G. J. Cox)  
 " La 28 an = Muzika Vespero.

Kunvenoj ĉiun Vendredon de la 7<sup>a</sup> ĝis la 9,30<sup>a</sup> vesp.

**London :** Esperantistoj vizitantaj London' on estas atentigataj pri la « Angla semajno », uzata tie ; Sabaton posttagmeze estas duonlibertago, kaj tial la Brita Esperantista Oficejo estas fermata Sabate de la 1<sup>a</sup> tagmeze, ĝis la lundo. Tamen la Esperantistoj kunvenas en « Hyde Park » (ne intermiksi kun « Kensington Gardens », okcidentaj de Hyde Park). La kunvenoj okazas apud la grandega statuo de « Achilles » en la parko, apud « Hyde Park Corner ». Sed, se okazas parolado, estas ĉe la « Marble Ark » (Marmora arko). Restoracio LYONS, 7 Brompton Road S. W. I. (proksime de « Hyde Park Hotel ») Ĝi estas unu el la malmultaj restoracioj LYONS kiuj ne fermiĝas dimanc'e. Se pluvas, estas ĉe subvojo de la stacidomoj South Kensington ĝis la verdejo ĉirkaŭ la Muzeo : « Natural History ».

Dum Majo oni te-mang'os en la « Ring Tea House », norde de la Rivero Serpentine, en la mezo de Hyde Park.

**BELGUJO.** — St. Gilles apud Brussel'o : Dum Pentekosto (23-24<sup>a</sup> de Majo) okazos la *Belga Esperantista Kongreso*, C'ESTU G'IN !

**Ledeberg.** — La Tagiĝo. Mardon la 27an de Aprilo Sro Varendonck parolis pri « Lerneja Vivo ».

• Nia Folieto » deziras seriozajn kunlaborantojn kaj korespondan-tin-on en ĉiuj landoj.

La abonantoj kiuj ne ricevas « NIA FOLIETO » 'n estas petataj atentigi la redaktejon pri tio.

Eldonas : « LA PROGRESO »  
 Koophandelsplaats, 11 Place du Commerce.  
 GENT Belgujo GAND.